Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2011

La redakcio kaj legantaro de la bulteno sincere kaj tutkore gratulas nian la plej junan membron okaze de lia dua naskiĝtago! Kara Davido-Armano, estu saĝa, bela, sana E-isto, ni ĉiuj, kune kun viaj gepatroj, fieros je viaj atingoj sur la verda tereno!

Hodiaŭ kun plezuro ni informas, ke la lasta kunsido de la E-societo estis dediĉita al temo, ideo de kiu ŝvebis inter ni dum longa tempo – prezentado de E-o por usonanoj. Fake faris tion prezidinto de la E-societo Vilĉjo Mania kun sia teamo. Ili pretigis la prezentadon por reklami la IL-on en diversaj kolegioj de Ŝikago kaj ne nur.

Davido

Denove proponas al vi legindaĵon s-no Gregoro Dolgin (okaze de 1-a de Aprilo – tago de rido kaj humuro). Pri interesa kunlaboro inter partner-uboj Ŝikago-Varsovio informas d-ro L. Kordylewski.

Legu kaj laŭeble helpoprete reeĥu al problemo de familio de Halina Gorecka. Se iu pretas helpi, bv sendi vian ĉekon al nia kasisito, kiu poste prizorgas la tutan aferon. Anticipe danko! –La Redakcio

***Prezentado de Esperanto**: Dum la lasta kunveno de nia E-societo unu el prezidintoj konatigis nin kun tre utila prezentado de E-o por gejunuloj. Tion faris Vilĉjo Mania kune kun siaj filino kaj koramatino. Por la ekzemplo de esperantigo estis elektita monologo de Hamleto en traduko de L.N.M. Newell:*

Ĉu esti, aŭ ne esti: jen demando,
kiu plej gravas: ĉu pli noble estas
suferi en l' anim' la kuglojn, sagojn
de l' violenta sorto, aŭ preninte
armilojn kontraŭ maro da mizero,
rezisti por ĝin fini?

Kvankam la prezentado ricevis aldonojn kaj korektojn, sed, sendube, ĝi servos kiel bonega propagandilo de nia kara lingvo en Ŝikagio.

–Araneo

Unuminuta Historio

Eltrajniginte, ies avo aliris busan haltejon. Buso ankoraŭ ne estis videbla. "Ĝi aperos baldaŭ. Atendu!" – diris avo al si mem.

Inter du vicoj de aŭtomobiloj, starantaj antaŭ ruĝokula signalilo, kuretis gazetara kolportisto. Lin vokis ŝoforo de kamioneto kaj aĉetis dikan gazeton.

"Al ties laboro neniu envias, precipe nun, januar-vetere, – elspiris la avo. – Kaj ĉu homoj bezonas dikajn gazetojn?.."

Sur la kontraŭa flanko de la stratkruciĝo, atendante verdan signalon "iru", iu fraŭlo dancetis por varmiĝi. Renkonten alruliĝis malhela "Mustango", kaj tuj post ĝi, laŭ la maldekstra strio – hela "Toyota", el kies flanka fenestro aperis vizaĝo de juna virino.

"Evidente, ŝi volas ion demandi", – supozis la avo.

Preskaŭ tuj li, ankaŭ la dancanta fraŭlo, la kamionŝoforo kun dika gazeto, la kolportisto kaj des pli ruĝa okulo de l' strata signalilo rimarkis, ke ĉe la stira rado de l' "Mustango" troviĝas granda, rufkolora… hundo. "Mustanga" fenestro abrupte malfermiĝis, la rufhara kolo plilongiĝis kaj hundaj dentoj klakis ĉe vizaĝo de l' virino el "Toyota". Ŝi, stuporigita pro la subita timo, ne kapablis eĉ moveti. "Ankoraŭ unu hundimpulso kaj ties akraj dentoj atingos, estingos la helan vizaĝon! – sensone ekĝemis la atestantoj. – Nek ŝtono, nek eĉ kuglo sukcesus haltigi ĉi raban impulson!"

Forgesinta danci fraŭlo ekbojis. Bojis la avo. Hurlis lupvoĉe la kolportisto. Muĝegis bestoj feraj. Responde al la jena kakofonio tondris bojo de la rufhara besto. Ies mano kaptis la hundaĉan kolumon kaj ĵetis ĝin internen de la "Mustango". Virino el "Toyota", forsvingante de la vizaĝo timon, geste vokis la avon. "Por posteno de bojisto", – divenis li.

"Pardonon, mi rapidas!, – krirespondis li kaj montris flanken al buso, kiu siblis per la bremsiloj, ruliĝante al la haltejo.

"Stultulo!" – grumblis la kamionisto. – "Kial ne min invitis la ĉarmulino?"

Aŭtoj laŭ la transversa strato kvazaŭ ekstumblis. Ĉi-foje verda okulo palpebrumis al strato laŭlonga. Malhela "Mustango", hela "Toyota", kamioneto kun dika gazeto, aliaj viglaradaj aŭtoj, kaj post ili la avo jam enbusiĝinta, – ĉiuj ili impetis antaŭen. Degelis en postaŭta gasnebulo la kolportisto de dikaj gazetoj. Restis ĉe la stratkruciĝo en urbo Ŝikago guliversimila grandegulo laŭ nomo Lumigil'.

"Ankaŭ mi provos boji", – ekpensis ĝi. *–G. S. Dolgin*

Karlo kaj Klara –*Elrusigis G. S. Dolgin*

Amis najborinon Klara
Malavara Karl-poet',
Diris: "Jen por vi koraloj
Kaj aroma rozbuked'!"

Ankaŭ Klara al najbaro
Diris: "Jen por vi klarnet'".
Ŝajne, la ĝentila paro
Povus vivi en kviet'.

Tamen havis kara Karlo
Hundon kun la nom' Trezor.
Tamen havis kara Klara
Katon kun la nom' Azor.

Bojis hund', vidante katon.
Kat' minacis grati ĝin.
Evidente, ĉi rilatoj
Povus daŭri sen fin'.

Piedpuŝis katon Karlo
Kaj suferis hunda sort',
Ĉar pro venĝincita Klara
Ĝian voston premis pord'.

Do, koraloj donacitaj
Iĝis baldaŭ forŝtelitaj.
Malaperis eĉ klarnet'.
Kiu krimis? – Jen sekret'.

Kongreso de Esperanto-USA

Okazos la 17-20 de Junio en hotelo Woodfin Suites, Emeryville, Kalifornio, kiu situas trans la pontego de San-francisko.

La temo de la kongreso estos: Esperanto, la "alia" verda movado. En la nuna tempo, multaj parolas kaj okupiĝas pri la verda movado, nome: celado al pli ekologia vivado, konservado kaj reciklado de naturaj rimedoj. Sed la verda koloro kaj la ideo de verda movado jam apartenis al Esperanto de antaŭ cent jaroj. Kiel tiuj ĉi du movadoj interrilatas? Ĉu estas komunaj interesoj inter ekologiaj verduloj kaj la verda esperanta popolo? Ĉu prefere ni puŝu la ideon de Esperanto kiel nura lingvo sen ajna socia, interrilata, kulturprotekta kaj homfratiga enhavo?

Venu kun ni diskuti pri tiuj ĉi temoj en regiono avangarde verda, ambaŭ ekologie kaj esperante! La aliĝilo troveblas ĉe la www.esperanto-usa.org/en/node/2039

Grave/El Nia Leterkesto

– Elstaraj E-stoj, eldonistoj de la revuo "La Ondo de E-o" Halina Gorecka k Aleksander Korĵenko estas en malfacila situacio: por kirurga operacio de Halina estas bezonataj miloj da eŭrojn. Niaj membroj, pretaj helpi, povas sendi monon al nia kasisito (la adreso – apude) aŭ rekten al UEA konto "gore-z". Dankon!



– Baldaŭ Ŝikago kaj Varsovio festos la 50an datrevenon de sia ĝemeliĝo. Nia urbestro decidis je tiu okazo donaci la originalan skulptaĵon "Unueco" fare de la pol-usona artisto Jerzy Kenar, por ornami la centrurban parkon Frascati en Varsovio. Ŝikagano J. Kenar estas fama pro siaj gigantaj lignaj verkoj, kiuj ornamas la Internacian Flughavenon en Ŝikago kaj ankaŭ multajn templojn. Ĉi foje temas pri la grandega granitŝtona kreaĵo, kies lignan modelon montras la foto. Por sukcese finrealigi la eventon oni petas helpon de ĉiuj, al kiuj plaĉas la ideo. La informo riceveblas je www.jerzykenar.com. –*Raportis LK*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Aprilo – estos prezentataj urboj: Vankuvero (B. Mania); Ĉornobilo (V. Pajuk)

24an de Majo – Prelegos Marc Shafroth

26an de Junio – Tradicia Pikniko